**Agadraporto 2023 de la Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne**

La Federacio Esperanto-Bretonio organizas komunajn agadojn por la lokaj asocioj de Bretonio:

## Lokaj grupoj aŭ kontaktoj en

• Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Lannion, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.

• Finistère: Douarnenez, Morlaix.

• Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo, Pleugueneuc.

• Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.

• Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu, Couëron.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

**Membraro**: ĉirkaŭ 100-150. Inter ili estas 59 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj 43 partoprenas al komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France (Armor Espéranto kaj Espéranto Rennes).

## Agoj de la federacio:

**Prelegturneoj :** ne okazis granda turneo ĉi-jare sed pluraj vizitoj de eksterlandanoj: tri Ĉinoj, unu de Ĉeĥio (en kvin lokoj), unu Polino kaj unu Usonano en lokaj grupoj sed ne okaze de turneo.

**Financa helpo** al Ukrainino Oksana kaj ŝiaj du filinoj kiuj loĝas en Bretonio, por vojaĝi al la UK de Italio dum la somero 2023.

**Eldono de la federacia bulteno** *Verda Triskelo* kun 2 numeroj dum 2023  danke al la teamo de Hélène, Chantal kaj Josette.

**Retejo**: http://bretonio.esperanto-france.org/ administrantoj: Bert kaj Xavier.

**Reta diskutlisto** de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio@esperanto-france.org kun 209 abonantoj, administrata de Xavier. La diskutlisto ricevis  pli ol 100 mesaĝoj dum 2023.

**Retaj kunvenoj de la komitato** por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

**Jara kunveno okazis en Loudéac,** la 2an de aprilo 2023 , kun 12 ĉeestantoj + 6 prokuroj.

**Aliaj agoj de la lokaj asocioj kaj de membroj de la federacio**

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Partopreno kiel staĝanoj aŭ organizantoj de pluraj Bretonoj al eventoj en la kulturdomo de Greziljono: interkant-staĝoj, somera programo kun komunaj 10 tagoj de Renkonto de Esperanto Familioj (REF) kaj tendumado de la Verdaj skoltoj. Eblas legi pri aliaj agadoj de lokaj asocioj en la lastaj numeroj de Verda triskelo.